

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Jarkunveno 2023

Ni, NPO Esperanto Jokohama havis la Jarkunvenon de la membroj en la 29a de januaro 2023, en Esperanto-Muzeo Jokohama. En ĝi partoprenis 13 membroj ĉeeste kaj 16 membroj per mandato aŭ letera voĉdonilo, el entute 41 membroj. En la Jarkunveno, jenaj proponoj estis aprobitaj.

1. Raporto pri 2022 kaj Plano pri 2023
2. Kasraporto pri 2022 kaj Buĝeto pri 2023
3. elekto de la estraranoj kaj reviziantoj por la mandato 2023 kaj 2024

Rezulte de la lasta punkto, jenaj personoj estis elektitaj:

(estraranoj) Arai Kazuhiro, Miyazaki Hideko, Namba Fumiharu, Sibayama Zyun'iti

(reviziantoj) Murata Kazuyo, Suzuki Keiichiro

Poste oni elektis Sibayama Zyun'iti kiel reprezentan estraranon, en la estrara kunsido.

La Jar-kajero 2022-a de Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama

Jen estas la skizo de la ĉefaj eventoj en 2022.

noto: [MZ] estas por Esperanto-Muzeo Jokohama. [IR] por interreto.

*feb. 28 [Guberniana Centro de Kanagawa] : La Jarkunveno de nia rondo.

*mar. 4 [IR]: la 123-a legokunsido, pri “Fronto aŭ Dorso”

*mar. 6: Ni publikigis jenon: “Nia deklaro timante la situacion en Ukrainio”, pri la milita invado de Rusio al Ukrainio. (Legu en NT n-ro 372).

*maj. 26-28: 9 en niaj membroj vojaĝis al Hanamaki kaj Toono, i.a. por viziti Ekspozicion pri Miyazawa Kenzi kaj Esperanto, okazanta en Hanamaki. (Vidu fotojn sur p.2.)

*jun. 6 [IR]: la 124-a legokunsido, pri diversaj libroj legitaj de la partoprenantoj

*jun. 25 [MZ]: Vizitis la Muzeon s-ro Johanness Ĝenberg el Svedio. La unua vizitanto al la Muzeo, vojaĝanta el ekster Japanio.

*aŭg. 8-15: La 105a Universala Kongreso okazis en Montrealo, Kanado. Partoprenis ĝin niaj 2 anoj, Namba Fumiharu kaj Suzuki Keiichiro. I.a. ili diskonigis la Muzeon. Suzuki prelegis en la Kongresa Universitato.

*sept. 2 [IR]: la 125-a legokunsido, pri “Krimeo estas nia”

*sept. 3 [MZ]: Prezento de spertoj de 9 el niaj anoj. (i.a. la UK-spertoj de 2 anoj)

*sept. 23-25: La 109a Japana Esperanto-Kongreso okazis en Hachioji, kaj pluraj el niaj anoj partoprenis ĝin.

*nov. 3-6: La 10a Azia-Oceania Kongreso okazis en Pusan, Seulo, kaj ĝin partoprenis Namba Fumiharu.


*nov. 20 [MZ]: Hama-Ronda Tago, ĉi-foje precipe pri la Muzeo.

*dec. 2 [IR]: la 126-a legokunsido, pri la Parto 1 de “Vojaĝo al Kazohinio”

*dec. 18 [Earth-Plaza, Tergloba Placo] : la 52a Zamenhof-Festo de Gubernio Kanagawa, kun nia rondo kiel la ĉef-rolanto.


El 2022-a ekspozicio en Hanamaki

Miyazawa Kenzi estis Esperanto-favoranto, kaj en 2022 okazis Ekspozicio pri Esperanto en la muzeo “Ihatova Halo de Miyazawa Kenzi” en Hanamaki. Kelkaj en niaj membroj vizitis ĝin. La fotoj montras tiam ekspoziciitajn librojn.



eseoj

Oni komencis rekonstrui la Kastelon de Ŝuri en Okinavo!



Doi Ĉieko

Jen la historio de la kastelo

Lastjare, en la 3a de novembro, oni komencis rekonstrui la Kastelon de Ŝuri en la urbo Naha, Okinavo.

Okinavo estas la plej suda gubernio en Japanio, inter Tajvano kaj la ĉefinsularo de Japanio. La gubernio Okinavo konsistas el pli ol 150 insuloj kun tropikaj klimatoj.

La kastelo de Ŝuri forbrulis en la 31a de oktobro 2019.

La kastelo estis konstruita en la urbo Naha, Okinavo, ĉirkaŭ la 14a jarcento. Ĝi estis la kastelo, kiu simbolas la historion kaj kulturon de Okinavo. Siatempe Okinavo estis nomata “Reĝlando de Riukiu”, kaj en la jaro 1429, unu gravulo unuigis ĉirkaŭajn insulojn sude de Japanio. Kaj en centro de la ĉefa insulo oni konstruis la kastelon Ŝuri. En la komenco de la 17a jarcento (komenco de la epoko Edo), Riukiu estis atakita de Sacuma-han, nun Kagoŝima, la plej suda parto de tiama Japanio. Siatempe Riukiu jam havis propran unikan kulturon. Tamen kiam Japanio komencis modernigi sin en la erao Meĵi (1868~1911), Okinavo estis aligita al Japanio, kaj malaperis la Reĝlando Riukiu, kiu



tamen daŭre tenis unikan kulturon, kaj la loko fariĝis ne Riukiu, sed Okinavo.

Iom antaŭ la fino de la Dua Mondmilito, en marto 1945, la usona armeo surteriĝis unue al Okinavo. Tiam multaj loĝantoj estis mortigitaj aŭ sin mortigis. La nombro de la mortintoj tiam en Okinavo fariĝis ĉirkaŭ 100,000. Intertempe ankaŭ la kastelo Ŝuri estis malkonstruita.

Kaj post la fino de la milito, Okinavo jam ne estis la tero de Japanio, sed ĝi apartenis al Usono. Tie ekestis milit-bazoj de la usonaj armeoj. 27 jarojn post la militfino, en 1972, finfine Okinavo povis aparteni al Japanio. Dum la tempo studentoj en Okinavo rajtis studi ankaŭ en la ĉefinsularo de Japanio, ricevinte vizon al Japanio per pasporto. Ankaŭ mi havis amikinson el Okinavo, kiu reiris al sia hejmloko tre malofte pro ekonomia malfacilo. Kiam ŝi estis ironta hejmloken, ŝiaj amikinoj inkluzive de mi forvidis ŝin en la fervoja stacidomo.

Nu, pri la kastelo Ŝuri, en la Dua Mondmilito la kastelo estis atakita de la usona armeo kaj forbrulis. La lokon poste uzis la universitato de Riukiu kiel studejon, sed finfine en 1992 oni transigis la universitatan domon aliloken, kaj rekonstruis la Kastelon Ŝuri. Kiel multe ĝojis la homoj en Okinavo! Ili jam ne estis usonanoj, sed japanoj kun la kastelo Ŝuri, rekonstruita en 1992. La kastelo estis agnoskita kiel Monda Heredaĵo en decembro de la jaro 2000.

En 2019, aŭtune post la Japana Esperanto-Kongreso en Saitama, mi, mia edzo kaj ges-roj Dieter kaj Yoshie Kleemann el Germanio, kune vojaĝis al Okinavo. Tiam ni vizitis ankaŭ la kastelon Ŝuri. Tiam kun fervoro, nekredible verve, gvidis nin loka junulino, kiu klarigis la historion de la kastelo. Ni estis ege kortuŝitaj. Tio okazis en la 16a de oktobro 2019.

Kaj en la 31a de oktobro, tio estis nur 15 tagojn post nia vizito, forbrulis la kastelo. Matene de la tago mia edzo ekkriis rigardante la televidan novaĵon, kiu informis la brulegon de la kastelo. Kio okazis? Eksciinte la brulegon ankaŭ mi estis ege ŝokita. Laŭ la infomo, 6 konstruaĵoj de la kastelo forbrulis. Eĉ nun oni ne scias kial okazis tia brulego. Ni imagis, kion pensas nun la juna ĉiĉeronino, kiu tiel verve gvidis nin en la kastelo.

Tuj post la forbrulego oni komencis planon de rekonstruo, kaj 3 jarojn poste, t.e. en novembro de la lasta jaro oni komencis rekonstruon. Oni komencis kolekti ĉarpentistojn kun alta scio pri tia konstruado. Necesos tri jaroj kaj ses monatoj. Ĉu ni povos travivi ĝis tiam kaj denove viziti la kastelon?



kun ges-roj Kleemann



ĉiĉerono

Kruringoj

Itabaŝi Micuko

Laŭ meteoprognozo januara vetero en 2023 estos malvarmega, precipe en la posta duono. Venis la tempo, kaj oni montris meteomapon al ni en televido. Blanka malvarmega zono kovris super Koreio kaj nia lando. Lastatempe mi deĵoras en Esperanta Muzeo en Jokohamo dufoje en monato. Deĵorejo estas ne tiel vasta, sed vasta por sola deĵoranto. Mi sentis malvarmecon precipe ĉe kruroj. Kaj mi rememoris mian infanecon.

Mi naskiĝis kaj kreskis en orientnorda regiono. Nun klimato de la tero plivarmiĝis ol antaŭe. En la kvindekaj jaroj de la 20a jarcento vintra temperaturo estis tre malalta. Ekneĝis en komenco de decembro. Kaj la neĝo tavoliĝis en la fino de la monato kaj ne degelis ĝis la fino de marto. Preskaŭ ĉiutage neĝis. Kaj ni iris al lernejo en tiaj veteroj. Nia vilaĝo estis tre vasta. Estis tri elementolernejoj, sed mezlernejo estis nur unu. Kaj ĝi staris meze de la vilaĝo. Domoj de multaj lernantoj estis for de la lernejo. Multaj el ni devis piediri pli ol kvin kilometrojn al la lernejo. Estis multaj vilaĝetoj en la vilaĝo, kaj iuj lernantoj devis trairi kelkajn vilaĝetojn.

Mi estis unu el tiuj lernantoj. Anoj en tiuj vilaĝetoj vivis memstare. Kiam ili ne havis iun aferon, ili ne vizitis reciproke. Precipe en vintra mateno ili ne

vizitis unu la alian. Tial freŝa neĝo kovris vojon inter vilaĝetoj. Ni mezlernejanoj devis vadi en la profunda neĝo celante la lernejon. Premita neĝo ekŝutis neĝpecojn kaj ili eniris en niajn botojn. Kaj ili degelis en la botoj. En lernejo ni ŝanĝis botojn al ŝuoj. Tamen kiam ni revenas hejmen, ni devas ŝanĝi ŝuojn al malsekaj botoj. Ni devis paŝi longan vojon kun malvarmigataj piedoj pro malsekaj botoj

Mia patrino trikiĝis paron da lanfadenaj kruringoj al mi. Ĉu vi konas, kio estas kruringo? Mia patrino diris ĝin 'kjahan' en la japana. Modernaj homoj nomus ĝin krurovarmigajon.

Ekironte al la lernejo mi respektive enmetas mian kruron kun krurumo de mia surmetita pantalono en la kruringon, kaj enmetas tiun tuton en boton. Kaj post tio mi faldas supraparton de la kruringo sur boton. La faldita parto kovras la randon de la boto. Kiam mi vadis en la neĝo, neĝo ne povis eniri en la boton barite per faldita parto, sed eniris en spacon inter la krurumo kaj kruringo. Tiukaze ne botoj, sed la pantalono kaj la kruringoj malsekiĝis. Tamen brulanta stovo estis en lernoĉambro. Mi povis sekigi malsekiĝintaĵon per ĝi.

Kun tiu memoro mi trikis paron da kruringoj. Ili estis ne tiel belaj, sed sufiĉe varmigis min en la Muzeo.



desegnita de Sibayama Noriko

EL NIA MUZEO

“Serio Oriento-Okcidento” ekspoziciota

En la teretaĝa ekspoziciejo de nia Esperanto-Muzeo Jokohamo, ni planas ekspozicii librojn de la monda literaturo, tradukita en Esperanton, kaj asignita en la Serio Oriento-Okcidento. Ĝis nun pli ol 60 titoloj estas en la serio, kaj ni posedas pli ol 90 procentojn el ili. Ni dankas ges-rojn Kleemann el Germanio, kies ofermono helpis nin aĉeti multajn el la titoloj el la libroservo de UEA.